



Japana malnova fabelo “いっすんぼうし” (Issunbousi”)

KNABETO

Ilustrita de lernantoj en Muja elementa lernejo

Esperantigita de KITANI Tomoko

Farita : Dec. 2015



※Japane “いっすんぼうし” signifas malgrandan knabeton esperante.




Antaŭ longa longa tempo seninfanaj geedzoj
loĝis.

Ili preĝis al dio ĉiutage.

“Donu al ni infanon.”

Post baldaŭ naskiĝis tiel malgranda bebo
kiel dikfingro.

Ili nomis ĝin Knabeto.



Iun tagon Knabeto diris al siaj gepatroj.


“Mi volas iri al la urbo por labori. Bonvolu prepari ĉion por mia vojaĝo.



Do liaj gepatroj preparis glavon el kudrilo
kaj boaton el supujo.

“Bonvojaĝu atente.”

“Mi iros, dankon.”




Knabeto remis boateton el supujo al urbo.



Knabeto vizitis grandan domegon en la urbo.

Mastro de la domego surpriziĝis pri la
malgrandeco de knabeto. Knabeto petis.

“Bonvolu dungi min ĉi tie.”



La mastro akceptis lian peton kaj dungis lin,
kiel zorganto de infanino en la domo.



Iun tagon Knabeto akompanis infaninon al templo.



Survoje du ogroj aperis antaŭ ili.

Ili intencis fortiri ŝin.



“Atendu!”

Portante glavon Knabeto saltis sur ruĝan
ogron.



Ruĝa ogro pinĉis kaj glutis lin.

En la ventro de ruĝa ogro, Knabeto svingis
sian glavon. Ventrodoloro dolorigis la ogron.



Sekve blua ogro aperis.

Knabeto subite saltis al lia okulo kaj pikis
ĝin.

“ Savu, Savu! ”

Du ogroj plorante foriris.



Post foriro de du ogroj restis stranga maleo.



Infanino svingis ĝin supren kaj malsupren.

Knabeto altiĝis pli kaj pli laŭ svingoj de la maleo.

Knabeto fariĝis bona viro kaj edziĝis al la infanino. Ili vivis feliĉe.

<La fino>